## Voĉdonilo por komitatanoj de ILEI, januaro 2011

1. La komitato akceptu la Regularon pri Reta Voĉdonado, kiel akceptita en Matanzas.

   ○ JES ○ NE ○ SINDETENO.

2. La komitato akceptu la revizoritajn spezokonton pri 2009 kaj ĉiujn eŭrobazitajn fodusojn.

   ○ JES ○ NE ○ SINDETENO.

3. La komitato provizore akceptu la raporton pri la svedkrona Fonduso Erika Linz kaj la bilancon por 2009, kies eŭro-bazita parto estas revizorita; difintiva akcepto okazu post sveda revizorado.

   ○ JES ○ NE ○ SINDETENO.

4. La komitato akceptu la aktualigitan interkonsenton kun UEA, kiel akceptita en Matanzas.

   ○ JES ○ NE ○ SINDETENO.

5. La komitato konfirmu la decidon el Matanzas pri la senŝarĝigo de la Estraro por 2009.

   ○ JES ○ NE ○ SINDETENO.

6. La komitato akceptu la buĝeton 2011, kiel proponata de la estraro.

   ○ JES ○ NE ○ SINDETENO.

7. La komitato akceptu la aliĝpeton de la landa sekcio en Serbio.

   ○ JES ○ NE ○ SINDETENO.

8. La komitato akceptas ke proponata sekciestro por nova sekcio devas membri en la Internacia ILEI por la jaro de la peto kaj unu antaŭa jaro (ne du.)

   ○ JES ○ NE ○ SINDETENO.

9. La komitato akceptas ke proponata reprezentanto por fondota sekcio devas membri en la Internacia ILEI en la jaro de la peto pri lisitgo (ne aldone en la antaŭa jaro.)

   ○ JES ○ NE ○ SINDETENO.

10. La komitato precizigas la ILEI Regularon, ke la postulataj 5 membroj necesaj por sekcia aliĝpeto devas esti membroj de la Internacia ILEI en la jaro de la pet-ektrakto. La pluvivo de sekcio postulas ĉiujaran anonciĝon de almenaŭ kvin internaciaj membroj.

    ○ JES ○ NE ○ SINDETENO.

11. La komitato akceptu la estraran proponon, ke la mandato de la nuna komitato, enoficigita en Krakovo, finiĝu en la 31ª de marto, 2012, tiel ke nova komitato oficu en Konferenco 2012.

    ○ JES ○ NE ○ SINDETENO.

**Notoj:**

1. La regularo estas afiŝita en nia retejo <www.ilei.info> sub 'Dokumentoj'. Trovu ĝin ankaŭ ĉi-kune. Voĉdonante por la akcepto ĉefe validigas la principon voĉdoni rete. La regularo difinas kiel tio okazu pere de retmesaĝoj. La estraro nun esploras pli efikajn manierojn voĉdoni, pere de vizitebla retejo. Akcepti la regularon ne malhelpas transiri poste al pli efika sed sufiĉe sekura mekanismo por realigi la voĉdonojn.

2-3. Afiŝitaj en nia retejo, sub 'Dokumentoj'. Liveritaj ĉi-kune; pli agrablas legi financajn dokumentojn en fizika formo!

4. La regularo estas afiŝita en nia retejo. Bv konsulti ĝin tie. Vi trovos puran version kaj markitan, montrante la ŝanĝojn. La estraroj de UEA kaj ILEI ambaŭ akceptis la tekston; la Komitato de UEA ĝin akceptis en Havano.

5. La Estrara raporto por 2009 troviĝas en la Konferenca Libro, rigardebla en nia retejo en PDF-formato.

6. Liverita ĉi-kune; pli agrablas legi financajn dokumentojn en fizika formo!

7. La aliĝpeta dokumento estas videbla en la retejo.

8-9. Tiuj estas nerealigitaj komitataj decidoj el Parma (2006); ni sekve nur rekonfirmas ilin.

10. Neniam estis klare, ĉu tiuj membroj devis esti internaciaj, aŭ enlanda membreco sufiĉus.

## Demandilo pri via komputila aliro

Por helpi al ni trovi plej bonan solvon por reta voĉdonado kaj perado de informoj.

- ○ Mi havas propran komputilon, ĉu hejman, ĉu laborejan.
- ○ Mi ne havas propran komputilon, sed povas aliri komputilon.
- ○ Estas por mi maleble aŭ tre malfacile aliri komputilon.

La operacia sistemo de la komputilo estas: ______________________________

La PDF-legilo en tiu sistemo estas: ____________________________________

(laŭeble kun versio numero).

- ○ Mi havas plenan retaliron por retpoŝto kaj vizitado de retpaĝoj.
- ○ Mi havas retaliron sed limigitan eblon viziti retpaĝojn.
- ○ Mi konsentas legi kaj laŭdezire elŝuti komitatajn dokumentojn de la ILEI-retpaĝo.

Se komitataj mesaĝoj venas al vi tra la komitata grupo al malkonvena adreso, bonvolu indiki tiun, kiun ni ekuzu:

________________________________

## Instrukcioj por resendi la voĉdonilon / demandilon

Ĉi tiu devas esti fizike sendita kaj respondita voĉdonado – espereble la lastan. Ni ne celas sekretan voĉdonadon; la specoj de decidendaĵoj estus en viva kunsido kutime farata publike. Por validigi vian voĉdonon, ni devas scii kiu vi estas. Evidente, la rezultoj estos aperigitaj nur en sumigita formo. Ni aperigos nur liston de tiuj komitatanoj, kies voĉojn ni ricevis, kaj kies ni ne ricevis.

Bonvolu plenskribi kaj subskribi la voĉdonilon kaj la demandilon kiel eble plej legible, kaj fizike sendu ĝin por alveni ĝis la 15ª de marto, 2011 al la sekretario de ILEI:

Małgosia J. Komarnicka
ul. Kilinskiego 14/3,
PL-59-300 Lubin
Pollando

Vi rajtas protekte komuniki pli frue viajn respondojn rete, sed nur voĉoj alvenintaj sur fizika respondilo estos allaseblaj. Tiuj respondoj post notado estos viŝitaj, tiel ke ili ne estu troveblaj per serĉmotoroj.

Sendu al <margareta.ilei.pollando@gmail.com> kaj <stefan.macgill@gmail.com>

==========**deklaro** ==============

Mi estas valida komitatano por la landa sekcio en ____________________ por 2010.

Nomo:________________________________

preslitere

Subskribo:__________________ Loko: _______________ Dato: _________________.